

## La fundamentoj de l'demokratio.

Univ. prof. d-ro In. Arn. Bláha.

21. 11. 1934.

Demokratio estas agitvorto de l' tago kaj epoko. Ĝia sorto estas la sorto de ĉiuj agitvortoj: La homoj ne akceptas ilin kun ilia plena, scienca enhavo, ili alproprigas al si nur la formon, formon ofte tute malplenan, kiun ili plenigas per siaj hazardaj sportoj, per nebulaj informoj, per sia neperfekta edukeco, per siaj kutimoj kaj antaŭjuĝoj sed precipe per siaj instinktoj kaj sentimentoj. Simile statas kun la agitvorto: Demokratio. Ni parolas kaj skribas pri demokratio, ni defendas, kritikis eĉ neas ĝin. Sed se ni objektive fiksus la enhavon de l' ideo de demokratio ĉe dek diversaj defendantoj kaj kontraŭuloj, eble montriĝus, ke ili ĉiuj nomas per la sama nomo dek diversajn enhavojn. Per alia enhavo plenigas la idean kadron de l'demokratio la liberalismo, per alia la socialismo, per alia la agrarismo.

Kiuj do estas la fundamentoj de l'demokratio? La respondo al tiu ĉi demando necesigas klarigi la ideo de l'demokratio. Mi respondos per vortoj de sociologo: La tuta popolo estu estro en sia propra domo. Tiun ĉi estrecon ni ne devas kompreni nur politike, sed ankaŭ ekonomie, racie kaj morale. Jen kion mi volas per tio diri: Sociala servutulo ne estas nur homo sen politikaj rajtoj, sed ankaŭ tiu, kiu ne estas memstara ekonomie. Donu al mi politikajn rajtojn, sed ne donu al mi panon kaj mi devos servi kaj eĉ vendi mian politikan liberecon al tiuj, kiuj estas ekonomie fortaj.

Sed la estrecon ni devas kompreni ankaŭ racie kaj morale. Esti estro en sia propra domo signifas, esti ankaŭ estro en sia propra kapo. Ne fremda racio ordonu en mia kapo! Mi mem kapablu pensi! Memstare kaj kritike. Donu al mi politikajn rajtojn kaj ekonomian sendependecon sed malebligu al mi la edukon al racia memstareco — kaj mi fariĝos viktimo de demagogo, kiu servigos mian racion al sia celo, kiu eble estas kontraŭpopola, kontraŭkultura, kontraŭsociala, kontraŭmorala.

Kaj la morala flanko de l'demokratio? Donu al mi politikajn rajtojn, ekonomian sendependecon kaj kritikan racion, sed ne donu al mi moralecon — kaj mi vendos ĉion en la plej unua korupta skandalo.

Ni vidas, ke la demokratio havas ne nur sian politikan kaj ekonomian flankon, sed ankaŭ racian kaj moralan, ke ĝi bazas ne nur sur sociaj institucioj, tio estas politikaj kaj ekonomiaj, sed ankaŭ sur la homaj animoj, iliaj klereco kaj moraleco. Demokratio do signifas, ke ĉiu homo estas fonto de rajto kaj potenco, ke ĉiu juste kaj home inde partoprenu la produktadon kaj distribuadon, ke oni ebligu animan evoluon al ĉiu, ĝi signifas, ke ĉiu sekvu la vojon de bono ne pro la minacanta leĝo, sed pro la bono mem. Demokratio, tio ne estas nur nova ordo, politika kaj ekonomia, tio estas ankaŭ nova ordo de l'spirito kaj koro.

En tio radikas la supereco de l'demokratio super ĉiuj ceteraj politikaj reĝimoj, ĉar ĝi faras pli bona la tutan homon, ĉar ĝi scias, ke neniu sociala reformo estas ebla sen radikala reformo racia kaj morala.

Per tiu ĉi egala akcentado de ambaŭ flankoj, nome de individua iniciatemo kaj de justa organizo de l' medio, la demokratio superas eĉ la liberalismon. Rekonante la demokration la liberalismo postulas en ĝia nomo protekton por la iniciatemo de la individuo, sed kiu plej ofte egalas al protekto de individuaj privilegioj. La liberalisma kompreno de l'demokratio forgesas, ke justa socio devas tiel organizi la socian medion, precipe ĝian ekonomian flankon, ke la avantaĝojn partoprenu ĉiuj anoj de l'socio kaj ne nur ĝia malplimulto. La amerika sociologo Veblen prave atentigis, ke la moderna teĥniko ebligas tiom da materia kaj spirita komforto, ke ĝi plene sufiĉas al ni ĉiuj. Dume ni vidas, ke la ekonomie forta malplimulto vivas en luksa komforto, sed la granda plimulto en neinda mizero. Jen la ĉefa eraro de l'liberalismo.

La socialismo bone ekkonis, ke la demokratio celas novan organizon ekonomian kaj politikan. Sed ĝi forgesas la alian flankon de la problemo. Ne sufiĉas nur nova ordo ekonomia kaj politika, necesas ankaŭ nova konduto de la homo, nova aŭtoritato racia kaj morala. Ekonomia materialismo devas kunigi kun persona idealismo. Ĉar demokratio bazas ne nur sur eksteraj kondiĉoj, sed ankaŭ sur internaj: sur la moraleco de l'homoj. La eksteran leĝon devas harmonie

kompletigi leĝo interna.

Ne sufiĉas voki: donu al mi demokration, ĉar demokratio same kiel kulturo, ne estas donebla. Oni mem devas ĝin doni al si, ni mem devas preni ĝin. Demokratio ne estas nur renverso en la estanta ordo ekstera, sed ankaŭ en la animo kaj konscienco de ĉiu el ni. En la historio estas nenio pli grandioza ol tiu ĉi klopodo de la moderna demokratio kaj la ekmovigo kaj sopirigo de la animoj en ĉiuj rondoj de l'popolo.

La moderna socio staras antaŭ tiom da gravaj taskoj, ke ne sufiĉas la fortoj de unusola homo aŭ de malgranda grupo por solvi ilin. La tuta popolo devas kunlabori je ilia solvo per sia racio, sentimento kaj volo. Tiun ĉi taskon tro simpligas al si la diktatoreca reĝimo opiniante, ke sufiĉas por ties solvo la sola volo al potenco samtempe neante racion kaj moralecon. La bonfarto de l'socio estas la rezulto de granda nombro da fortoj, la volo al potenco estas nur unu el ili. La bonfarto de l'socio ne havas sian fonton nur en la politiko, sed ankaŭ, kaj antaŭ ĉio en ĉiuflanka, plej ĝenerala anima kaj morala aktiveco kaj kreemo de la civitanaro. Tion klopodas efektiviĝi la demokratio superante tiel ĉiujn ceterajn reĝimojn.

Ankaŭ maŝino estas bela, sed pli ol maŝino valoras la homo. Kiam la ŝtato alproprigas al si la rajton decidadi en aferoj de konscienco kaj pensado de ĉiu civitano, tiam ĝi malaltigas la ĝeneralan spiritan nivelon, tiam ĝi degradas la homon al maŝino. La demokratio kontraŭe faras la homon pli homa. Certe, diktatoroj povas fariĝi por kelka tempo la estroj de politiko, kiu estas regata de materiaj fortoj kaj potenco. Sed la espero de demokratio je ĝia fina venko bazas sur la fakto, ke ĝi kreas politikan kulturon, tio estas kulturo, en kiu validas konsideroj logikaj, estetikaj kaj etikaj.

La estanta tempo estas maltrankvila. Sed ni kredas al la venko de l' kulturo super la naturo. Malaperis la leĝo de ĝangalo, malaperis la perforto el la interrilatoj de unuopaj homoj, malaperos la perforto ankaŭ el la interrilatoj inter la popoloj. Kio rajtigas nian kredon al venko de l' demokratio? La fakto, ke la demokratio evoluigas pli altan tipon de personeco kaj pli altan tipon de socia organizaĵo celanta per kunlaboro la bonon de ĉiuj siaj anoj.

Estas vero, ke demokratio estas en danĝero. Sed estas ankaŭ vero, ke neniam en la historio daŭre venkis materia forto fortojn spiritan kaj moralan. Tial ni evoluigu niajn fortojn spiritan kaj moralan. Sed antaŭ ĉio unuavice ni ĉiam estu homoj --- ĉar nenian alian sencon havas la demokratio. En tiu signo ni venkos.

Tradukis Th. K.